TEA-BULTENO

23ª JARO - N° 155 **NOVEMBRO-DECEMBRO** **N.11-12/2020**

Libro devas esti hakilo por la glacia maro kiu estas ene de ni.
Franz Kafka, germanlingva bohema verkisto (1883-1924)

Pensoj

Kara Legantaro!

Rapide estas alvenonta la fino de la 2020ª jaro kaj, kiel kutime, oni ĵetas rigardon al la pasintaj monatoj, pripensante kritike pri la bonoj kaj malbonoj kiuj tuŝis onin, rekte aŭ malrekte. Por tion precize prilumi, endas uzi pesilon, surmeti sur la dekstran pesiltason la bonojn (ricevitajn de... kaj disdonitajn al...) kaj sur la maldekstran la malbonojn (faritajn al... kaj suferitajn de...).

Ĉi-jare estas ege malfacile ekvilibrigi la du tasojn. La tuta situacio travivata de ni ĉiuj en tiu ĉi jaro baldaŭ finiĝonta estis tro eksterordinara, tro escepta, tro konfuziga, tro doloriga. Oni estis implikita en tiom da neantaŭvideblaj komplikaĵoj, da maltrankviligaj okazaĵoj, surverŝiĝantaj sur onin en tiel abrupta maniero, de unu momento al alia, ke reago adekvata ne ekzistis, kvankam kelkaj alarmokrioj estis eligitaj, sed en subpremita formo, sen la necesaj klareco kaj komprenebleco. Eble pro tio oni ne donis sufiĉan atenton al la okazantaĵo. La onidiroj cirkulantaj inter la civitanaro kaŭzis perdon de trankvileco, de memcerteco kaj ĉefe de fidindeco: kiun aŭskulti? kion kredi? Menso-klareco mankis, ĝis kiam la realo forigis ĉiajn dubojn kaj oni - konfuze kaj iasence sen plena konsciiĝo - komencis alfronti la tute neatenditan situacion, klopodante samtempe, laŭ propraj instinkto kaj naturo, elturniĝi en la ĥaosa situacio.

Per nenio nova mi plenigas ĉi folio-parton: ĉiuj havis sian stokon, pli aŭ malpli pezan, da suferoj, spiritaj kaj/aŭ fizikaj, da malfacilaĵoj en la ĉiutaga vivo, da koleraj aŭ deprimaj momentoj, sed multaj el ni, certe, malkovris en si fortojn kaj energiojn por mem strebi superi la novan problemaron kaj eĉ por solidarece helpi aliajn trabati la pluregajn barilojn aperintajn sur la vivovojo.

Ne ankoraŭ ĉesis la tutmonda epidemio, la estonteco antaŭ ni estas tro nebula por ekvidi iom da lumo fine de la tunelo, sed ni ne malesperu: ĉio pasos, ni reprenos nian vivon en niaj manoj kaj klopodos daŭrigi por atingo de la komunaj celoj kaj plenumado de niaj revoj. Neniam oni forgesos ĉi tuthomaran katastrofon, samkiel la multaj kaj multaj aliaj plagoj de la pasinta jarcento, de la antaŭpasintaj jarcentoj kies atestantoj dormas jam de longege la eternan dormon, ne estis forgesitaj sed transdonitaj al postaj generacioj, por daŭra memoro. Ni sukcesos venki ĉi tragikan eventon, precipe se dum la travivado de ĉi malfeliĉegaj kaj suferegaj okazaĵoj ni kapablos eligi la plej belajn kaj bonajn sentojn aldirektendajn ne nur al la loĝantoj de niaj etaj nestoj, sed al ĉiuj homoj, proksimaj kaj malproksimaj, samgentanaj aŭ fremdaj, malriĉaj kaj..., jes, eĉ riĉaj, senkonsidere de religia, lingva, etna, politika, seksa ktp apartenoj. Abunde ŝtoneca estos la vojo antaŭ ni, precipe en la ekonomia kaj sanitara kampoj, sed se el ĉio ĉi ni lernos ke eĉ simpla aŭskultado estas grava signo de amo kaj empatio al aliaj, la alcelpunkto iom post iom pliproksimiĝos.

"Amu vian proksimulon kiel vin mem!": ĉi universale konataj vortoj, ĉeestantaj en ĉies koro kaj menso kaj apartenantaj al neniu aparta kredo, aŭ filozofio, aŭ politiko, helpos nin iradi antaŭen, kuraĝe kaj ĉiuj kune.

Bonajn ontajn Festotagojn, via redaktanto Elda

Jes, la vivo....

„Jes, la vivo estas plena
Eĉ plenega de malĝoj',
Nur malofte brilas bena
Sunradio sur la voj'."

Jenon mi tre ofte audis,
Kaj pripensis en silent'.
Mi esperis kaj revadis
Ĝis alvenis nova sent'.


Lingvo nia, ho benata!
Stelo verda de l' esper',
Estu ĉie vi semata
Por la amo sur la ter'.

Rubčič.

DIALEKTOJ DE IAMAJ FIŜISTOJ EN ADRIATIKA MARO

Iam en Triesto

Ofte oni diras, ke maro unuigas gentojn kaj popolojn el diversaj devenlandoj. Tiu ĉi komunikilo kaj perilo inspiris multajn scienculojn kaj akademianojn al profunda esploro de etnoj kaj lingvoj, precipe inter la 19ª kaj 20ª jarcentoj, en la teritorioj de Triesto kaj Graz, inter kiuj ili starigis interfakan reton da kontaktoj kaj interŝanĝoj.



Tiuj fakuloj trovis sian mentoron en la lingvisto Hugo Schuchardt, naskita en 1842 en Gotha, Turingio. Fininte la studojn de klasika kaj romanĉa filologio (en Jena, Bonn, Leipzig, Halle), li profesoris pri Romanistiko ĉe la Universitato de Graz. Sekvante sian "teorion de ondoj", prilaboritan kun la germana lingvisto Johannes Schmid, laŭ kiu la evoluo de lingvoj sekvas horizontalajn moviĝojn, tiamaniere influantaj unu la alian, H. Schuchardt estis daŭre fascinata de la studo pri *hibridaj* idiomoj en tiuj socioj karakterizataj de multlingvismo, tiom ke li iĝis la Patro de studado de la kreola lingvo en Centra Ameriko, sed ankaŭ pri la lingvafrankaoj (kiel sabiro[1)] aŭ piĝino) kaj miksitaj lingvoj mediteraneaj. Ĝuste tial, pro interesiĝo je ĉi apartaj temoj, li havis apartan atenton pri la tuta marbordaro Adriatika, precipe pri la triesta-istria areo, sekve de trafa konatiĝo kun du junaj lingvistoj, devenantaj de la ĉemara Istrio, Antonio Ive kaj Giuseppe Vidossich. Doktoriĝintaj en Vieno, ambaŭ ekkarieris en Graz kaj – okaze de siaj esploradoj aŭ libertempado en la duoninsulo Istrio – de tie ĉi ili ofte eksendadis poŝte al Schuchardt eseojn pri la lokaj dialektoj, inter kiuj kelkaj ekzemploj de miksitaj lingvoj.

En 1884 Hugo Schuchardt dediĉis lingvistikan esplorajon "Slawo-Deutsches und Slawo-Italienisches" (slava-germana kaj slava-itala) ĝuste al tiuj miksitaj idiomoj de la suda areo de *Carniola*[2)] (Karnjola), de Karsto al norda Istrio. Ankaŭ laŭ alia vojo la lingvisto kontaktiĝis kun la scienca reto pri la marbordoj. Laŭ lia teorio, la lingvoj ne estas nuraj komunikadkodoj, pli-malpli rigoraj, kiujn oni banale lernadas pere de gramatikaj kaj sintaksaj reguloj - tiel kiel liaj kolegoj ofte faradis. Li, male kaj konvinke, konsideris lingvon kultura kodo, per fortaj ligiloj koneksan al la ĉiutaga vivo. Pro tio li ne nur esploris la lingvistikajn formojn sekvante ja la vortojn, sed ankaŭ studante la konkretan kulturon de iu lingvogrupo, alcele analizita: laŭ sia teorio "Wort und Sache" (vorto kaj aĵo/materia havaĵo), Schuchardt ekdediĉiĝis al etnologio, al arigado de ĉia ajn objekto kiu povus akompani analizon de ia dirmaniero. De ĉio ĉi, serĉante la miksitajn lingvojn en la ĉemara Istrio, li pasiiĝis por la materia kulturo kaj la fiŝkaptadaj teknikoj de la nord-adriatikaj marbordaj komunumoj.

De siaj kunlaborantoj, Ive kaj Giuseppe Vidossich, li ricevis objektojn de la istraj popoloj, de la grada[3)] kaj triesta marbordoj, kiujn li konservis skrupule. Intertempe li kunplektis ĉiam pli viglajn rilatojn kun la naturhistoria Muzeo de Triesto. Fakte tiu Muzeo, kies nomo ŝanĝiĝis al "Muzeo Ferdinando Maksimiliano", ekde la 1870ª jaro specialiĝis pri faŭno kaj flaŭro de Adriatika maro.

Carlo de Marchesetti[4)], iĝinta ties direktoro ekde 1876, publikigis sciencajn eseojn pri la mara faŭno ĉe la marbordoj aŭstriaj, kaj sendis plurajn referaĵojn al Mara institucio en Triesto kaj al la Komerca ministrejo en Vieno. Tiuj ne estis nur simplaj tekstoj sciencaj, sed entenis utilajn informojn pri la metodoj de ekspluatado de tiuj ekonomiaj trezoroj ĉeestaj en la adriatikaj akvoj: danke al modernigo de la fiŝkapta tekniko kaj konservada sistemo, estis transdonitaj fontoj de gajno kaj evolueblo. Kunigante sian interesiĝon pri naturo kun tiu pri antropologio kaj tekniko, Carlo de Marchesetti dediĉiĝis precipe al esploro de fiŝado, ne nur de la marbordo aŭstria, sed ankaŭ de la fiŝad-teknikoj uzataj en Afriko kaj Azio, kontinentoj de li vizititaj tiucele.

En 1880 la Muzeo ricevis la plej altgradan rekonon internacian pro sia rolo kiel mara laboratorio. En tiu jaro la triesta scienca institucio partoprenis en la granda Internacia ekspozicio pri fiŝado en Berlino. Tiuokaze ĝi gajnis oran medalon. De Marchesetti renkontiĝis kun la lingvisto de Graz, Hugo Schuchardt, kiu sekve de tio plurfoje vizitis Trieston kaj ties ĉi marbordon, ekkonatiĝinte kun la plej eminentaj sciencistoj, Attilio Hortis[5)] kaj Richard Francis Burton[6)], kun kiuj poste li komencis amplekskan interkorespondadon. Per la interŝanĝitaj leteroj, plenaj je diversaj gravaj informoj pri la mondo de fiŝado nord-adriatika, la du scienculoj, uzantaj inter si la germanan lingvon, sukcesis trovi komunan renkontiĝ-spacon por plurfaka interŝanĝado. En letero de 1905 de Marchesetti sinteze klarigis tiun ĉi specialan rilaton: "La sciencoj interpenetras sin reciproke en tiel heterogena maniero, ke unu direktiĝas al la alia celante ambaŭan subtenadon".

Bedaŭrinde la fama lingvisto Schuchardt, post la komenco de la mondmilito, forigis de sia vivo multajn rilatojn kun la mondo de la ro-

→

manĉa lingvo, retiriĝis en privatecon kaj mortis en Graz, en 1927.

Li estis eklektika eminentulo: interlingvisto, fakulo pri latinidaj kaj eŭska lingvoj, pri dialektoj – piĝinoj, kreolaj kaj mediteranea lingvafrankao - k.a. Ne nur pri tiuj li interesiĝis sed ankaŭ pri Volapuko kaj Esperanto. En 1888 li skribis *Auf Anlass des Volapüks* (Okaze de Volapuko) pledante por kreo de internacia helplingvo por ĉiuj nacioj kaj klopodante kontraŭstari la antaŭjuĝojn de siaj lingvistaj kolegoj pri nova helplingvo por la tuta homaro.

En 1901 li partoprenis en la komitato por krei la Delegacion por alpreno de lingvo internacia.

Fontoj: El artikolo aperinta en la triesta tagĵurnalo *IL PICCOLO*; Vikipedio.

Notoj:

1) Sabiro (*sabìr)*: Mediteranea lingvafrankao, kies leksiko konsistas ĉefe el la itala kaj hispana lingvoj kun kelkaj terminoj arabaj, kaj el gramatika sistemo ege simpligita, uzata por la plej simplaj komercaj rilatoj inter eŭropanoj kaj araboj; ĝenerale ĉiu lingvo, naskiĝinta inter malsamlingvaj komunumoj.

2) Carniola (elp: Karnjola): Histori-geografia Regiono situanta inter la orienta Friulo, okcidente; Karintio, norde; Stirio, Kroatio kaj Istrio, eoste kaj sude.

3) Grada (adjektivo de *Grado*): Turisma urbeto, en Friulo Julia Venetio, ĉe la adriatika marbordo, apud la elfluejo de rivero Isonzo (elp: Izonco).

4) Carlo DE MARCHESETTI: Triesta arĥeologo, paleontologo kaj botaniko, ekde 1876 iĝas direktoro de la Urba muzeo pri natur-historio. En 1903 li ekgvidas la Botanikan ĝardenon, institucion kiu akiras sciencan renomon tuteŭropan. Carlo de Marchesetti okupiĝas precipe pri la regiona flaŭro.

5) Attilio HORTIS: Advokato, historiisto, politikisto kaj direktoro de la urba biblioteko. Li estis deputito por Triesto ĉe la Viena parlamento; membro de la Akademio de la *Crusca;* senatano dum la Itala Regno ekde 1919.

6) Richard Francis BURTON: Brita esploristo, tradukisto kaj orientalisto. Li estis brita konsulo en Triesto, kie li mortis en 1890.

POEZIO EL ĈIUJ ĈIELOJ SESA FOJO 2020

Konkurso pri poemoj en Esperanto kaj la itala lingvo. Sen partopren-kotizo!
Ajna poemtemo estos akceptita. Rajtas partopreni ĉiuj poetoj el nia planedo.
La versaĵoj devos alveni en la itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj. La poetoj devas partopreni per unu poeziaĵo ne pli longa ol 50 versoj entute. Oni sendu ĝin, kune kun la aliĝilo, per retpoŝto al:

samideano@hotmail.it

Por enskribiĝoj kaj aliaj detaloj vidu ĉe

https://www.iconcorsidisamideano.it/poezio-el-ciuj-cieloj-sesa/

Kristnaska Poemo

de Endre ADY[1]: **Karácsonyi rege**
en la Esperanta versio de Adrienne PÁSZTOR[2]

KRISTNASKO

I.
Turo tondras,
kantoj sonas,
zumas foren dankokantoj.
En la kara vilaĝeto
je Kristnasko
pentofaras la kredantoj.

Hom' ĉitempe,
amoplene,
surgenue petpreĝetas.
En la kara vilaĝeto
la Mesio
al estonto espervekas.

Longavice
altempliĝe
junaj, oldaj homoj paŝas
en la kara vilaĝeto,
dankopreĝo
al la ama Dio pasas.

Kvazaŭ, sube
dia pure
sankta graco flustrus, flugus,
en la kara vilaĝeto
ĉiukore
nune, nur la amo lumus.

II.

Premas min la grandaurba
bruo kruda,
bone estus la soleno
miahejma.

Bone estus purakore
-kiel foje-
dankemiĝi,
bone estus senpremiĝi.
Bone estus, povi:
tutforgesi.

Bone estus: ludadanta
bebo esti.
Per infana kredo, koro,
pri la mondo
repaciĝi,
pace, ame beatiĝi.

III.

Tiu ĉi fabelo
se estiĝus kredo,
vere granda ĝojo
flugus al la mondo.
La falema homo
estus ree homo,

talizman' lin savus,
estus bona homo.

Nia tera vojo
estus ne Golgoto,
regus unu volo

en la granda mondo.
En la religio
gravus nure tio:
Dio havu gloron,
homo amu homon…
Kristnaska fabelo

se reala iĝus
ĝojo por eterno
en la mond' estiĝus.

Noto 1)



La hungarlingva ĵurnalisto kaj poeto Endre ADY, naskiĝinta la 22an de novembro 1877 en Transilvanio kiam tiu landoparto estis hungara (lia naskiĝa vilaĝo, Érmindszent, apartenas hodiaŭ al Rumanio, kaj li nomiĝas Ady Endre en la hungara kaj Mecentiu en la rumana). Li estas konsiderata unu el la plej gravaj poetoj de la aŭstra-hungara kulturo, samtempe animinto de movado ("Nyugat" – Okcidento), kiu celis malfermi la hungaran kulturon al tiu eŭropa.

En sia mallonga vivo (li mortis je nuraj 42 jaroj - 1919 -, en kliniko pro mensaj malsanoj, konsumita de sifiliso kaj alkoholo) li estis profeto de baldaŭ dissolviĝonta mondo, vigla ĉampiono de hungareco, sensema kantisto de pasio kaj deziroj, sed ankaŭ engaĝita sur la soci-politika kaj religia tereno; atestas pri tio la memorŝtono, kiu sur la fasado de hotelo *Imperiale* en la roma strato *Vittorio Veneto*, tiel memorigas lin:

En ĉi tiu hotelo restadis Endre ADY (1887-1919)
poeto de la destino de la deziroj kaj de la revoj
de la hungara nacio

Fontoj: www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo/2017/11/26/mihaly-babits/
Plurlingva biografio troveblas ĉe eo.wikipedia.org/wiki/Endre_Ady

Noto 2) Sinprezento de la tradukistino:



Mia nomo estas Adrienne PÁSZTOR. Mi havas 77 jarojn kaj naskiĝis en Miskolc. Mi esperantiĝis en 1962 kaj estas membro de UEA ekde 2006. De 2005 verkas kaj prozojn kaj poemojn; en 2006, amatornivele, mi ekesperantigis ankaŭ literaturaĵojn. Krom tio, mi kutimas aranĝi literaturajn memorfestetojn honore al doktoro Kolomano Kalocsay, libro-ekspoziciojn pri Eo-lingvaj libroj kaj aliaj eldonaĵoj. Okaze de la 100-jariĝo de miaurba Esperanto-movado, en 2013, mi organizis solenan celebradon, dum kiu estis inaŭgurita la memortabulo al d-roj Ludoviko Győry Nagy kaj Kolomano Kalocsay: Ili estis la pioniroj en Miskolc, kiuj startigis la unuan Esperanto-lingvokurson en 1913.

Laste trovitaj!

Ekde kiam cirkulis tra la mondo la tiel diritaj poŝtaj kartoj, tio estis proksimume post la unua duono de la 19a jarcento, tiuj eldonaĵoj ricevis grandan favoron flanke de la korespondantoj, ĉar pli praktikaj - sufiĉis skribi la adreson en la 'severe' indikita spaco, kaj kelkajn salutvortojn, korespondproponojn, inviton al vespera balo ktp, laŭ la onia bezono - malplikostaj, pli elegante ornamitaj ol la simplaj kovertoj. En tiuj tempoj oftis ekzemple sendado de poŝtkarto eĉ inter samurbanoj: tiam, kiam telefono estis ankoraŭ en *embria stadio* aŭ raraĵo por ordinaraj personoj, oni kutimis skribi matene por rendevuo posttagmeza: kaj la renkontiĝo ja poste okazis, ĉar la poŝtista servo funkciis multe pli bone, ol nuntempe. Tion ĉi ofte rakontis al mi mia avinjo.

Havante la poŝtkarto tiom da ecoj, nature estis multe uzata de esperantistoj por komunikadi tra la tuta mondo, sed ĉefe ĝi fariĝis la plej utila kaj vaste ekspluatenda malmultkosta propaganda rimedo. En tiuj jaroj komence de la 20a jc, la artismaj ecoj senbridiĝis, kaj fojfoje estis engaĝitaj la plej lertaj desegnistoj/grafikistoj, el tiuj ankau kelkaj esperantistoj, kaj... la fantazio ekgalopis senlime.

Kompreneble la plej reprezentata persono estis nia Majstro: vere atentokaptajn artaĵojn li inspiris. Okaze de la 8a UK en Krakovo, aŭg. 1912, aperis diversaj tiutemaj poŝtkartoj, iuj koloraj aliaj nigraj-blankaj: en ĉiu el ili ne povis manki portreto de L. Zamenhof. Du el tiuj estas tre allogaj ĉefe por ni triestanoj, kaj unu aparte kurioza.



Sur la supra karto aperas la fotoj de la "Eminentuloj de Aŭstrio kaj Hungarujo", kies nomoj estas, de maldekstre: s-ro R. Rusčič, s-ino Zipernowsky, Julius Patzelt[1], prof. Otto Simon[2], G. Scholze. Meze: d-ro De Racz, d-ro Odo Bujwid[3], d-ro L. L. Zamenhof, d-ro Sándor Giesswein[4]. Plie: "9. Jubilea Kongreso, Krakovo 11 – 18 aŭgusto 1912. Sube: d-ro Arturo Ghez[5], d-ro Adolf Bischitzky[6], YH Fuchs, Julius Boschan[7] kaj s-ino Ella Morawets[8].

Ne ĉiuj nomoj kaj esperantistoj estas de mi konataj, sed esplorante tien kaj tie ĉi, mi trovis iajn sciigojn, en la Enciklopedio de Eo, en malnovaj ĵurnaloj retigitaj aŭ en Vikipedio. Kio estas plej grava por ni triestanoj, estas la portreto de Arturo Ghez[5)], esperantisto ekde 1898 kaj unua prezidanto de Rondo Esperanta Triesto (1906), lingva komitatano (1911), brila oratoro, propagandisto kaj verkisto. Tamen ne malpli atentindaj estas la aliaj "Eminentuloj" pri kiuj oni povos legi mallonge en la subaj notoj.

Kaj nun "**LA KURIOZAĴO**"!



Estus bone armiĝi per bonkvalita lupeo kaj per ĝi, harfendeme, kontroli ĉiajn plej etajn detalojn. Eldonjaro, ĉiam 1912, jaro de la 8ª Internacia Kongreso de Esperanto, Krakovo. Denove la Eminentuloj de Aŭstrujo. Ĉi-foje ne iliaj fotoj, sed krajona kopio de la fotoj. Lertas la desegnisto, ĉar, komparante la bildojn kun la fotoj de la antaŭa poŝtkarto, facile rekoneblas pluraj Eminentuloj. Ĉiu el ili, escepte de la virinoj, ĉe la jaka botontruo, portas la verdan, aŭ pli precize dirite, pro la krajone desegnita karto, la *nigran* stelon.

Meze, alta arbo, kun branĉoj plenaj je steletoj, sub kies interplektiĝo la Zamenhofa kapo kronita per folia ornamaĵo. Dekstre kaj maldekstre staras la Elstaruloj, kaj la unua, dekstraflanke, estas la triesta prezidanto d-ro prof. Arturo Ghez, kun enmane libreto, el kiu certe li ĉerpas inspiron por sia honorparolado. Alia grava rekono de la valoroj de nia pioniro!


IO PRI KELKAJ EMINENTULOJ!

1) Julius PATZELT, pioniro de Esperanto en Aŭstrio-Hungarujo, vera apostolo en norda Bohemujo. Korespondis kun Zamenhof. Fondis multajn grupojn kaj gvidis konstante kursojn. Eldoninto de la gazeto *La migranto* kaj de pluraj Esperanto-lerniloj. Sur lian tombon, en la tombejo de Horní Podluži, Germana Esperanto-Ligo starigis monumenton.

Otto SIMON (naskita en Vieno, 1876; mortinta en Usono, 1941) estis aŭstra juda pioniro de la E-Movado, instruisto pri Matematiko kaj Fiziko, ankaŭ ĉe la Nova komerca akademio en Vieno. Esperantisto de 1902 post legado de la franca revuo de Ch. Méray - fama matematikisto. Li estis la prezidanto de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista kaj kunlaboris kun multaj tiutempaj E-revuoj. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio de Esperanto.

(fonto: Enciklopedio de Esperanto)

Odo BUJWID (naskita en 1857, Vilno; mortinta en 1942, Krakovo) estis pioniro de Bakteriologio kaj Higieno, unu el la unuaj polaj sciencistoj okupiĝintaj pri vakcinoj. Lia agado por Esperanto komenciĝis en 1912, kiam li fariĝis la prezidanto de la 8ª UK en Krakovo. Postmilite li estis prezidanto de la Tutpola Federacio de E-societoj. Havante gravajn rilatojn kaj konatecojn en la regantaj polaj medioj, ofte li atingis favorojn por nia lingvo kaj esperantistoj (pasportoj, vizoj k. a.). Danke al liaj pledoj la pola respublika prezidento Józef Klemens PIŁSUDSKI, mem fariĝis favora al Esperanto kaj akceptis la patronecon de la 23ª UK 1931, kies prezidanto estis Bujwid. Ankaŭ lia merito estis, ke la pola radio elsendis novaĵojn pri esperanto.



Julia C. Isbrücker kaj Odo Bujwid dum la ekskurso al Pompejo okaze la 27ª UK en Romo, 1935

(*NdR: konsilindas legi interrete pri la agado de tiu ĉi fama pola sciencisto kaj esperantisto*)

Sándor GIESSWEIN, hungaro, prelato kaj politikisto. Naskiĝinta en 1856, Tata, li mortis en 1923, Budapeŝto. Krom teologiaj studoj li okupiĝis multe pri filologio, sociologio k.s. Pioniro de pacifismo, feminismo kaj de aliaj sociaj reform-projektoj. En 1912 li iĝis esperantisto kaj prezidanto de Hungarlanda E-Societo ĝis sia morto. Li faris paroladojn pri Eo en multaj hungaraj urboj, pledis kelkfoje por nia lingvo en la parlamento, dum du UK-j reprezentis la hungaran ministron pri edukado. Dum pluraj kongresoj li celebris Di-servon kaj predikis

Esperante. Dum la unua mondmilito li fervore subtenis la kontraŭmilitan movadon.

Adolf BISCHITZKY (naskita en 1871, Driz, mortis en 1934, Prago) estis ĉeĥoslovaka germano, kuracisto kaj esperantisto. Estante humanisto kaj liberpensulo, li prezidis la Ĉeĥan Ligon de Homaj rajtoj. Kunfondinto en 1908 de la Societo de germanlingvaj esperantistoj en Prago, ties ĉi prezidanto li iĝis en 1911. Li gvidis kursojn kaj estis profesoro de Esperanto en la germanlingva Komerca Akademio en Prago. Kunlaboris kun pluraj E-revuoj, el kiuj *Internacia Medicina Revuo*, *La Marto* k.a. Lerta tradukisto, li verkis ankaŭ ekzercaron por germanoj (1922).

Julius BOSCHAN, germana esperantisto, komercisto pri teknikaj iloj. Li dediĉis sin tre serioze al Esperanto, kaj estis poste unu el la ĉefaj fondintoj de *Esperanto-Verein Verda Stelo Prag.* Ĝia fonda kunveno okazis en la kafejo *Edison,* la 26^{an} de januaro 1909, ĉeeste de proksimume 50 personoj. Prezidanto estis elektita prof. d-ro Siegiried Lederer, dum li, sekretario.
Ella MORAWETS, redaktorino de la revuo *La Marto.*

Mi invitas vin legi iom pli pri kelkaj el la eminentuloj menciitaj en la revuo *La Marto*, jaro 1912. Vidu en la arkivo de la Muzeo de Esperanto en Vieno:
http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e2h&datum=1912&size=45

Kaj nun, tasko por vi, karaj legantoj!
Kvizo: kiu kapablos doni al ĉiu gravul/in/o, staranta en la dua poŝtkarto, la koncernan nomon, ricevos libro-premion. Limdato por sendo al testudo.ts@gmail.com la 31^{an} de decembro ĉj.

Se neniu sukcesos rekoni ĉiujn, gajnos la premion, kiu divenos **la plej multon el ili.**

Bonan amuziĝon! ***ElDo***

Aforismoj

La libero estas kiel poemo: ĝi ne havas adjetivojn, ĝi estas... libero!
Enzo Biagi *(1920–2007)*
Itala ĵurnalisto, verkisto kaj televida kondukanto

La Naturon oni estras nur obeante al Ĝi.
Francis Bacon, angla filozofo (1561-1626)

Libereco-gradon de iu societo oni povas juĝi enirante en ĝiajn malliberejojn.
Fyodor Mikhailovich Dostoevskij, (1821-1881)
rusa verkisto, eseisto, ĵurnalisto kaj filozofo

Ideoj estas pli potencaj ol nukleaj armiloj.
Fidel Alejandro Castro Ruz (1926-2016)

Novembre: Sidejo fermita

Sekve de la lasta regularo pro la kronvirusa epidemio, la TEA-sidejo restos fermita ĝis la 25^{a} de novembro. Okaze de novaĵoj, ni kontaktos vin!

Decembra Programo

1a, mardo	18h00 - Kurso de Esperanto
2a, merkredo	14h50 - Alirprogramo RAI UNO Fantazia renkontiĝo kun la iniciatoro de Esperanto
4a, vendredo	20h00 - El interreto, pri Esperanto
8a, mardo	**Festotago**
11a, vendredo	20h00 - Noveloj de A. Iannacone
13a, dimanĉo en Triesto	10h00 - Ni atendas vin ĉiujn por kunfestado de la **ZAMENHOF-TAGO!**
15a, mardo	18h00 - Kurso de Esperanto
18a, vendredo	**20h00 - Kristnaska kaj Jarfina Festoj** **Kune por k per Esperanto!**

Bonan Kristnaskon 2020^{an}
kaj Pacan k Sanan 2021^{an} Jaron
al la TEA-anoj kaj Gelegantoj



deziras Triesta Esperanto-Asocio!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org